

POLA ESPERANTISTO

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO.

ESPERANTYSTA POLSKI

MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE.

ROK XXI. JARO.

KRAKÓW
KWIECIEŃ 1927 APRILÓ

Nr. 4. N-o

ESPERANTO NA FALACH ETTERU.



PRZED rokiem rozpiśało angielskie czasopismo radjowe »Radio-Times« ankietę w sprawie przyjęcia języka międzynarodowego w radjofonji. W tym celu zwróciły się »Radio-Times« do wybitnych przedstawicieli rozmaitych narodowości o wyrażenie opinji, który język nadaje się najlepiej do zajęcia stanowiska organu międzynarodowego w dziedzinie radjotelefonji.

Wynik ankiety był bardzo pouczający: Francuzi gorąco popierali swój język ojczysty. Anglik uważał język angielski za najdoskonalsze narzędzie międzynarodowego porozumiewania się. Rosjanie nie mogli zrozumieć, że wybór języka rosyjskiego mógłby być przedmiotem jakichkolwiek wątpliwości. Niemcy, powołując się na wielkie rozpowszechnienie języka niemieckiego poza granicami Rzeszy i jego pokrewieństwo z językami: duńskim, szwedzkim, norweskim, angielskim, holenderskim i flamandzkim, dowodzili, że tylko ich język ojczysty ma największe widoki zdobycia palmy zwycięstwa w zawodach o wybór światowego organu porozumiewania się.

Odpowiedzi otrzymane przez redakcję »Radio-Times« wykazują dobitnie, że o nadaniu jednemu z języków narodowych roli języka wszechświatowego niema mowy i że na ogólne przyjęcie w dziedzinie radjofonji liczyć może jedynie język neutralny, bo tylko taki język nie uraża niczyjej dumy narodowej i nie spycha języka żadnego narodu do rzędu języków »drugiej klasy«, co byłoby nieuchronnem następstwem podniesienia jednego czy też kilku bardziej rozpowszechnionych języków europejskich do godności oficjalnych organów światowego obcowania. Neutralnym zaś jest z natury swojej tylko język sztucznie stworzony.

»Broadcasting« nie może się obejść bez języka międzynarodowego, bo audycje wygłaszane w języku narodowym docierają wprawdzie do kilku, a przy odpowiednio silnej energii w antenie nadawczej nawet do kilkudziesięciu krajów różnojęzycznych, ale korzyść stąd niewielka, skoro tylko pewna

część słuchaczy może zrozumieć dany wykład, odczyt czy komunikat. Stacje radjofoniczne pokrywają swojemi falami ogromne przestrzenie świata, ale wysiłek ich w dużej mierze idzie na marne, bo przecież najciekawszy nawet odczyt, wygłoszony przez wybitnego uczonego w języku fińskim, duńskim, bułgarskim i t. d. jest dla milionów posiadaczy radjoodbiorników zupełnie tem samym, czem najpiękniejsza symfonia dla głuchego.

Cóż zatem trzeba uczynić, ażeby ci głusi »odzyskali słuch«? Trzeba poprostu wprowadzić do radjofonji neutralny, bardzo prosty i łatwy do nauczenia się, a przytem giętki i bogaty język Esperanto. Przeciętny radjoamator, nie obdarzony szczególnymi zdolnościami językowymi i nie znający żadnego języka obcego, może i powinien już po 3-miesięcznej nauce przyswoić sobie znajomość Esperanta do tego stopnia, by mógł zrozumieć dostatecznie każdy komunikat czy odczyt wygłoszony przez mikrofon w tym języku. A nie trzeba zapominać, że Esperanto posiada pierwszorzędne walory języka »radjofonicznego«, a to dzięki swej wyrazistości, mającej swoje źródło w zupełnej koordynacji między pismem a wymową, w bogactwie samogłosek i w niezmienności końcówek gramatycznych, ułatwiających szybką orientację, do jakiej gramatycznej części mowy należy zaliczyć zasłyszane słowo (końcówka o — rzeczownik, a — przymiotnik, e — przysłówki i t. d.). Pod tym względem żaden język t. zw. naturalny nie może współzawodniczyć z językiem esperanckim.

A więc wprowadzenie Esperanta do radjofonji to dopiero muzyka przyszłości — mógłby ktoś pomyśleć? Bynajmniej nie!

Cały szereg stacyj nadawczych europejskich i zamorskich nadaje regularnie kursy języka Esperanto, a od czasu do czasu także innego rodzaju audycje w tymże języku. Przodują w tym kierunku Niemcy, gdzie wszystkie stacje radjofoniczne (a jest ich 23) poświęcają raz w tygodniu część swego programu audycjom esperanckim. Po stacjach niemieckich wymienić należy francuskie i rosyjskie, po nich idą szwajcarskie, hiszpańskie, duńskie, austriackie, amerykańskie, japońskie i t. d.

Mnóstwo czasopism radjowych, że wymienimy tylko Radio-News (U. S. A.), Radio-News (Kanada), Wireless Weekly (Australja), Experimental Wireless (Anglja), Magyar Radio-Ujsag (Węgry), Radio-Welt (Austria) i wiele innych przyjęło Esperanto jako międzynarodowy język radjowy.

Największa na świecie organizacja radjoamatorska American Radio Relay League badała przez dwa lata kwestję języka międzynarodowego i po gruntownej rozprawie powzięła w sierpniu 1924 r. uchwałę, mocą której uznała Esperanto za swój oficjalny język międzynarodowy, polecając swym członkom wyuczenie się tego języka.

Odbyta w kwietniu 1924 r. w Genewie międzynarodowa konferencja radjotelefoniczna uchwaliła jednomyślnie, by wszystkie stacje nadawcze

przynajmniej jeden raz w tygodniu o oznaczonej godzinie nadawały lekcje języka Esperanta. Wyłącznie w języku esperanckim wychodzi w Paryżu doskonale redagowany miesięcznik »Internacia Radio-Revuo«¹⁾, organ Międzynarodowego Zrzeszenia radjoamatorów (Internacia Radio Asocio). Staraniem wydawnictwa powyższego miesięcznika pojawił się słownik radjotechniczny opracowany przez G. Malgorn i Dr. P. Corret, zawierający około 350 wyrazów technicznych z dziedziny radjotelegrafji w językach esperanckim, francuskim, angielskim, niemieckim, włoskim i hiszpańskim.

Miłośników dat historycznych zaciekawi wiadomość, że fale eteru po raz pierwszy uniosły w przestworza dźwięki mowy esperanckiej w dniu 19 czerwca 1922, a odnośną audycję nadała stacja WJZ. Newark, New Jersey dzięki staraniom Mr. James Denson Sayers, redaktora dziennika New York Evening Post.

Dr. Leon Rosenstock, Kraków.



ANTONI LANGE.

ESPERANTO JĘZYKIEM RADJA. ESPERANTO LA LINGVO DE RADIO.

Radjo zbliża bardzo dalekie narody mówiące rozmaitymi językami. Przez radjo możemy słyszeć jak mówią po angielsku, holendersku, węgiersku, turecku, fińsku, łotewsku i t. p. Zazwyczaj nie docenia się tego faktu. Niektóre stacje nadają przemówienia w języku powszechnym dla ogółu zrozumiałym, mianowicie po esperancku.

Już przed kilku laty, otwierając wystawę w Wembley, król Jerzy przez radjo wygłosił jedną i tą samą mowę po angielsku i po esperancku.

Wiadomo, że aeronauci przyjęli esperanto w celu wzajemnego porozumie-

Radio proksimigas tre malproksimajn naciojn, kiuj parolas diversajn lingvojn. Per radio ni povas aŭdi kiel oni parolas angle, holande, hungare, turke, finne, latve k. t. p. Kutime oni ne plene konsideras tiun ĉi fakton. Kelkaj stacioj disaŭdigas la paroladojn en ligvo tutmonda, por ĉiuj komprenebla, nome en esperanto.

Jam antaŭ kelkaj jaroj, malfermante la ekspozicion en Wembley la reĝo Georgo per radio diris la saman paroladon angle kaj esperante.

Oni scias, ke la aeronautoj akceptis esperanton por la celoj de ko-

¹⁾ Administracja: S-ro Etienne Chiron, 40, rue de Seine, Paris 6-e. Abonament roczny 1/2 dolara.

wania się. Radjo jeszcze w większej mierze wykazuje potrzebę takiej mowy powszechnej i łatwej do ujęcia jak esperanto. Nie jedno zagraniczne pismo radijowe pomieszcza wykłady języka esperanto. Czesi i Niemcy zrobili sobie z esperanta jeszcze jedno narzędzie własnej propagandy. I Polacy mogliby pójść za ich przykładem. Radjo doskonale się nadaje do tego celu. MoŜnaby codziennie pół godziny mówić o Polsce do całego świata po esperancku. Spróbujmy a zobaczymy, czy da się osiągnąć w ten sposób rezultaty konkretne.

muna interkomprenigado. Radio ankoraŭ pli sentas la bezonon de tia lingvo tutmonda kaj facila, kiel esperanto. Multaj eksterlandaj radiogazetoj publikigas kursojn de esperanto. Ĉeĥoj kaj Germanoj faris el esperanto unu pluan ilon de propra propagando. Ankaŭ Poloj povus sekvi ilian ekzemplon. Radio bonege taŭgas por tiu celo. Oni povus ĉiutage duonhoron paroli esperante pri Polujo al la tuta monda. Ni provu kaj konvinkigu, ĉu oni povos tiamaniere atingi konkretajn rezultojn.



L A V E L K I N T A F O L I O .

S-ro Henriko ne mortis, kiel opiniis multaj samideanoj.

El kie devenis la famo pri lia morto?

Kiam iu, tre sindonema, forlasas siajn amikojn kaj forveturas en danĝeran, malproksiman vojaĝon, li dividas kun la forlasitoj siajn impresojn kaj anime estas kun ili, konigante siajn aventurojn, sukcesojn kaj malsukcesojn. La forlasitoj ofte parolas pri li, rememoras liajn agojn, kutimojn, kaj senpacience atendas leterojn. Kiam letero alvenas, ili legas ĝin fervore, ĝoje, kaj longe, longe nutras sin per ĝi, ĝojante, kvazaŭ pro trezoro.

Subite la leteroj ĉesas venadi. Tempo pasas. La maltrankvilaj amikoj skribas, telegrafas — sed ricevas nenian respondon. La maltrankvilo fariĝas doloro, la necerteco — funebra certeco: li pereis.

En sia juneco s-ro Henriko estis fame konata samideano, unu el la » eminentuloj « kaj komandantoj de la granda armeo de paco. Ne ekzistis oferoj, kiujn li ne metus sur la altaro de l' ideo; ne ekzistis baroj, kiuj povus lin haltigi, nek ventoj, kiuj povus estingi la flamon de lia fervoro.

Poste li laciĝis. La birdo mallevis la flugilojn kaj reflugis teren. Kaj tie, sur la tero, svarmas amasoj, batalantaj ne pro ideo, sed pro la ĉiutaga pano. Kaj la ideano, refluginte teren, forgesis rigardadi supren kaj restis malsupre.

Tempo pasadis. Esperanto ne interesas plu s-ron Henrikon. Tio ja estas utopio; ĝi havas nenian ŝancojn. Ĝi taŭgas por junuloj, sed seriozaj homoj havas ion alian por fari.

La verda pac-armeo iris ĉiam antaŭen, sed en ĝia stabo ne estis plu s-ro Henriko. Aliaj pioniroj fariĝis komandantoj kaj vigle gvidas la armeon al la venko. Oni honoras tiujn, kiuj pereis sur la posteno, oni forgesas tiujn, kiuj nerimarkite malrapidigas la paŝojn kaj restas malantaŭe.

Multaj jaroj forpasis.

S-ro Henriko sidas en sia kabineto. Nun li havas novan »manion«. Dio gardu — ne Esperanton, nek ian ajn »ismon«. Lia nova ŝataĵo estas io utila kaj agrabla, io, kio vere dolĉigas la hejman vivadon kaj permesas al homo, sidanta en sia ĉambreto, sorĉe aŭdi malproksimajn, misterajn, de la tuta mondo alvenantajn voĉojn.

Li sidas ĉe la aparato kaj kaptas ondon post ondo, sonon post sono. Ĉe la turno de lia mano voĉoj malaperas, forkuras en spacon, neaŭdeblaj plu por lia orelo — anstataŭe aperas novaj, kvazaŭ pro turno de ringo de potenca sorĉisto.

Sonas »jazz-bandoj«, koncertoj, deklamoj, prelegoj, komunikoj. Ondoj vibras tra la spacoj, serĉas favorajn aŭskultantojn kaj karesas iliajn orelojn per revemaj valsoj, viglaj mazurkoj, grandiozaj priskriboj de famekonataj temploj aŭ sekvindaj konsiloj pri plej bonaj pudingaj pulvoroj.

La radio-bulteno kuŝas sur tableto, for de li. Plej agrable estas kaptadi ondojn trafe-maltrafe, ne sciante, kion ili flustros en la oreleon.

Jam la tutan vesperon s-ro Henriko sidas ĉe sia aparato. Li estas jam laca de tiu ĥaoso de diversaj melodioj, diversaj temoj kaj diversaj lingvoj. Ekregas lin nova sento — bezono de harmonio, kvazaŭ senkonscia sopiro al ia sintezo kaj rememoro pri io, iam amata, hodiaŭ forgesita.

For tiun senton, kiun inspiris certe nur trolaciĝo de la tuttaga profesia laborado! Ni distru nin! ankoraŭ unu ondon ni kaptu!

Trafe-maltrafe li turnas la korbon. Venas novaj sonoj. Sed ĉu vere novaj por li? Iam, antaŭ longe, li ja aŭdadis ilin. La mano forfalis de la korbo. Li aŭskultas tiel, kiel oni rigardas vizion el transmondo. Lian koron io premas, io ekkaptis lin je la gorgo.

Li fermas la okulojn. Aperas vizioj. Vizioj de l' tempo pasinta, en kiu li, malriĉa studento, estis pli feliĉa, ol nun. Vidigas svarmantaj amasoj — unu frate premas la manon de l' alia — sur ĉies brusto brilas malgranda stelo — la verda stelo. Kaj inter ili — li, feliĉa, plena de entuziasmo...

Kaj la alportata de l' radio melodio, tiel bone konata, tiel kara al ĉiu esperantisto, sen laŭtiga tubo potenciĝas en liaj oreloj kaj kreskas en

ĥoron, en la ĥoron, kiun iam, en malproksima tempo, li mem partoprenis, kantante kun la tuta fervoro de juneco la kanton pri l' espero.

La kanto finiĝis. Nun eksonas vortoj. Vivaj vortoj de tiu lingvo, kiun li iam amis, kaj poste malkonfesis. Li aŭdas la malnovan poeziaĵon:

Se longa sekeco aŭ ventoj subitaj
Velkantajn foliojn deŝiras,
Ni dankas la venton, kaj, repurigitaj,
Ni forton pli freŝan akiras...

Do ili vivas! Ili vivas kaj fieras. Kaj li? Pri li neniu plu pensas. Li estas la velkinta folio — li mortis! Kaj tiumomente li eksentas sin folio, kiun ventego faligis teren, kiun, kuŝantan sur la tero, premas homaj piedoj... Tie, sur la branĉoj verdas novaj burĝonoj; li, la defalinto, baldaŭ enpre-mota en la teron, ĉesos ekzisti.

Li deŝiras la aŭskultilon de la kapo. »Vere mi fariĝas tro nervema. Certe mi devas ripozi. Kio pasis, tio ja estas pasinta!«

Sed malica koboldo flustras en lian koron: »He, ĉu vi nur estas tute certa, ke tio pasis?« Io logas lian penson al la aŭdita versaĵo. El la polvo de forgeso li eltombigas la ceterajn strofojn, — al tiuj miksas sin aliaj poeziaĵoj kaj ĥaose bruas en lia kapo. Ĉu li ne sukcesos ordigi tiujn mal-ordigitajn pensojn? Li ja havas ie ankoraŭ la libron..

El fundo de malnova librokesto li eltiras flaviĝintan, disfalantan libron kaj komencas legi...

Lidja Zamenhof.



„SONETOJ DUOBLAJ“.

I.

DOLOR' PER AKRAJ DENTOJ KORON MIAN MORDAS
 KAJ MI ESTAS SIMILA AL LA SOMNAMBULO,
 MALGRAŬVOLE LA SENTOJ, KVAZAŬ LAŬ POSTULO,
 EN OBEO HUMILA, EN NODON SIN TORDAS.

TAMEN PLENE TRANKVILA PACO KORON ORDAS,
 TUTE SEN LA LAMENTOJ KAJ SEN LA SKRUPULO,
 NUR KUN LA VITROBRILA FLAMO EN OKULO
 MI SUFERAS... TURMENTOJ VENKE MIN REKORDAS.

SED NEK UNU PAROLO PRO TIU SUFERO
 EN VUNDITA KOR' MIA RIPROĈE EKVEAS —
 ESTI DEVAS JA FORTA HOMA KARAKTERO.

NUNE MI AL FORTVOLO KONSTANTE OBEAS
 DE L' DOLORO EBRIA, TAMEN KONSCIENCE
 MI PER PULSO AORTA REGAS MIN POTENCE.

II.

HĜ, KIEL DOLĈA SENTO ESTRI LA DOLORON
 KAJ DE PROPRAJ MIZEROJ ESTI VENKREGANTO,
 AL LA ĜEMAJ AFEROJ NE MONTRI FAVORON,
 NEK POR UNU MOMENTO MALSTREĈI RIGORON.

EN KONSCIA PRUDENTO, PER FORT' DE L' GIGANTO
 KONTRAŬ ĈIUJ SUFEROJ FERMI SIAN KORON...
 SE MINACAS DANĜEROJ, CEDAS NUR TIMANTO —
 KAJ PRI SIA LAMENTO KANTAS NUR PEDANTO.

NUR PER UNU ELSTREĈO DE L' FORTO POTENCA,
 EL KOR' MIA ELĴETIS MI ECOJN NE VIRAJN —
 EN ĜI NUNE LA MEĈO BRULETAS NENIA

DE LA SENTO HUMILA AŬ PLORO SENSENCA,
 KIU ĈIAM MAGNETIS LA VORTOJN INSPIRAJN...
 NUN MI ESTAS TRANKVILA, PLENA DE L' FORT' DIA.

STANISŁAW KAROLCZYK (ESKA).



WŁADYSŁAW ST. REYMONT.

SUPER LA ABISMO.

(DAURIGO).

La kortego tremis antaŭ lia vizaĝo simila al nubo graveda je fulmotondroj, fia paleco de timego kovris la vizaĝojn...

Li eliris ne atentante je iu ajn.

Sed li ne sciis kien iri kaj kion fari, ŝanceliĝis kiel arbo ŝirata de ventego, vagis senhelpe en la silentaj, malproksimaj ĉambroj de siaj infanoj.

Tamen li ne eniris al ili, rigardis ilin de malproksime per ia subite ekklarmiĝinta rigardo.

Ili ludis en granda, blua salono, sidis sur tapiŝo are, babilante kiel birdoj.

Li foriradis kaj revenadis, ne povis forŝiriĝi, rigardis tiun ĝojan bildon per la okuloj de malespero, subaŭskultis la ĉirpadon, kisis per la rigardoj la rozkoloraj vizaĝetojn, fiksitis en memoro, kirasis per ili sian koron plorantan per subita ploro de senlima bedaŭro...

Li forŝiriĝis fine kaj forkuris en sian turon solulan.

Informoj de la batalkampo mankis ankoraŭ.

Anstataŭe el la nigra, pluvanta nokto elŝiriĝadis jam ĉiam pli oftaj resonoj de batalo, iafoje bruegis funebraj tondroj de la kanonoj. Brulaŭroj ĉirkaŭe terure bilis ĉirkaŭ la metropolo, svinganta la ruĝajn tukojn.

Novaj aroj da ĉagrenoj sidiĝis sur lia animo kaj novaj aroj da timoj, kaj subitaj alfluoj de kolero ŝiris la koron.

La bildo de l'infanoj staris senĉese antaŭ la memoro, pendis en la mi-

naca teruro de timo, vekante kreskantan furiozon.

Li ne povis jam sidi kaj atendi, fajran lafon sentis en la vejnoj kaj la kolero skuis lin kiel sieĝatan tigron. Malamego ekhurlis en li kaj sovaĝa, sanga venĝo streĉis liajn dorson kaj manojn tiel, ke li volonte ŝirus, mordus, piedpremus, verŝus la sangon de malamikoj kaj venĝus pro tiuj suferoj, kiujn li estis travivanta.

Li sentis sin kiel malliberigita fulmo, kiel dio katenita per katenoj de nevenkeblaj fortoj...

Li jetadis sin en la malplena, soleca ĉambrego, etendante kontraŭ la urbo la manojn malsatajn je venĝo — kaj tiu urbo malamega, tiu urbo ribela kuŝis tuj antaŭ li, kovrita per la nokto, potenca kaj terura en sia giganteco, kuŝis tiel proksima kaj neatingebla por liaj feraj ungegoj de venĝo kaj kolero... neatingebla...

Silentis minace tiu malamiko malbenita kaj nepardonema.

Nur la maro hurlis sian kanton senceŝan kaj sur la ponto en la flagro de torĉoj, en ritma tinto de ĉenoj ŝoviĝis vicoj da iaj homoj eskortataj de la bajonetoj.

Oni kondukis la kaptitojn en la kastelajn kavernojn.

Tremigis lin sovaĝa, rabobesta ĝojo kaj li ordonis konduki sin tien, falis per la liftoj en subteraĵojn kiel vulturo al la manĝo, kaj ĉiam pli profunden, ĝis la kavoj faritaj en la roko, ĝis

la ŝtonaj, teruraj grotoj, kie kvazaŭ larmoj verŝitaj dum jarcentoj kovradis la murojn per maldolĉaj ŝimoj kaj gutetis kiel puso de la gotaj arkaĵoj. En iu grandega kaverno apoganta sin je la manoj de l'kolonoj sidis ja juĝ-istaro.

Kelkaj homoj en kapuĉoj kaj maskoj nigraj sidis ĉe la tablo, en profundaj apogseĝoj kaj kondamnadis.

Torĉoj enmetitaj en ferajn tenilojn fumis semante sangan lumon de teruro kaj timo.

Li sidigis malantaŭ la juĝistoj, en ombro, ĉe la piedoj de Kristo, kiu pendis de la muro, granda, sango-kovrita, plendinda, terura pro la sufero de l'agonio kaj senmorta kiel doloro, kiel la eterne viva doloro homa.

Kaj el la profundoj de la senfundaj truoj fetorantaj per ŝimo de la tomboj, eliradis senfinaj vicoj de kondamnotoj.

Iris muljunaj kaj junaj, virinoj, kaj infanoj, iris kun malĝoja bruo de katenoj kaj kun mallaŭta, tremiga ploro, iris similaj al fantomoj de mizeroj kaj malsatoj, kaj haltadis sentimaj, kiel eternaj plendoj, kiel suferoj kaj malbenoj de tuta homeco.

La prokuroro legis longan litanion de iliaj pekoj kaj krimoj.

— Morton! — faladis verdikto mallonga kiel frapo de hakilo.

Tamen la trenataj al la martirado kriis triumfe:

— Nin postesekvas libereco kaj justeco!

Kaj ili malaperadis en la krepuskoj de l'kazematoj, kaj konstante el la nediveneblaj profundoj aŭdigis bruo de salvoj kaj kvazaŭ knaro de pendi-

giloj, kaj iafoje penetris mallonga, sukofata, terura kri'...

Kaj li rigardis kal aŭskultis.

Kaj konstante novajn, senfinajn vicojn oni kondukis al la juĝo kaj jetadis ilin vengeme en la senfundan kavon de l' morto.

En la fumaj briloj de l'torĉoj, kvazaŭ en sangaj vaporajoj traĵadis aroj da viroj, nigraj ankoraŭ pro pulvo, ŝiritaj de kugloj, spirantaj pro batalo, heroaj kaj minacaj kiel fulmoj.

— Morton! — faladis sur ilin la ekzekutista frapo de l'hakilo.

— Nin libereco postesekvas kaj justeco! — ili kriis forirante al mort' sentima.

Preterpasadis junuloj belaj kaj gajaj, similaj al dioj.

Preterpasadis maljunuloj kadukaj, apogitaj je la pranepoj.

Preterpasadis nigraj kaj blankaj kaj flavaj kaj ĉiuj popoloj kaj ĉiuj rasoj kaj ĉiuj sferoj de simplaj plugistoj ĝis la reĝoj...

Kaj ĉi senfina oferema procesio enfaladis en la fetoran kavon de l' morto... Jam ŝajnis, kvazaŭ ĉiujn subteraĵojn plenigas la kadavroj kaj la sango fluas riverege, ŝvelas kaj levigas ĝis la arkaĵoj kun bruo kiel la mar' ĉe l' alfluo...

— Ĉiuj kontraŭ mi?

Li ĝemis, alpremante sin senkonscie al la piedoj de Kristo, kiu per larraj okuloj de mizerikordo rigardis tiujn kapojn de l' martiroj kaj kvazaŭ benis ilin por la eterna vojo, por la nova, senmorta vivo...

— Sed kial? Kial? — Li demandis kun ĉiam pli profunda timo

de propra animo, plena je l' kom-
pato.

Fine oni alkondukis aron da kna-
boj, preskaŭ infanoj, kun okuloj kiel
ĉielo kaj vizaĝoj de keruboj.

Tamen ankaŭ tiuj estis kulpaj kaj
je ili estis falonta la hakilo de l' ek-
zekutisto.

la blindiga vero trapenetris lian
cerbon kaj ĉirkaŭvolvis la koron per
fero pezega, li forŝovis la juĝistojn
kaj per akra voĉo ordonis liberigi
ilin kaj ĉiujn, kiuj atendis ankoraŭ
sian vicon. Malfermiĝis larĝe la ka-
zematoj kaj el ĉiuj koridoroj, el ĉiuj
kavoj, el ĉiuj subteraĵoj elfluis sen-
finaj amasoj homaj, plenigante la
halon per timema flustro de l' ĝojo...

Li staris ĉe la piedoj de Kristo,
rektiĝinte, malgaje, kun vitra nebulo
en la minacaj okuloj kaj rigardis
rekte en iliajn vizaĝojn.

La flustro malrapide transiradis
en bruon, en krion, la homoj kura-
dis kiel frenezaj, eksplodis ridoj fu-
riojaj, ploroj pepis, kaj la amaso
kreskis senĉese, ĉirkaŭante lin per
densa rondo da kapoj rabavidaj,
muĝoj, etenditaj pugnoj, miloj da
okuloj trapenetris lin kiel akraĵoj de
la spadoj, vundantaj mortige, sen-
kompatate, ĝis fine el ĉies brustoj el-
ŝiriĝis unu terura krio:

— Ekzekutisto! — kaj kraĉis en
lian vizaĝon kvazaŭ la tutan sangon
de l' mortigitoj.

— For! — Li ekkriis forpuŝante
ilin per gesto de tia potenco, ke ili
flanken disŝoviĝis kaj li eliris malra-
pide kaj fiere.

La granda konsilantaro kunveninta
en la tronhalo atendis lin jam de-
longe, ĉar la kurieroj alkuradis de
la batalekampo kun ĉiam pli minacaj
informoj. Timegon li vidis en la oku-
loj de l' servistaro, timo tremegis en
ĉies koro, kaj la tondroj de l' ka-
nonoj bruis en ĉiu angulo, tamen li
iris malrapide kaj lace kvazaŭ sub
la pezo de l' antaŭaj krioj.

Oni malfermis antaŭ li la pordon
forĝitan el bronzo.

Amaso da ministroj, estroj, konsi-
lantoj, amaso da princoj kaj sinjoroj,
kunvenintaj de la tuta mondo, ne
levis sin por lin saluti, oni sidis ĝi-
bitaj, silentaj kaj kadavre palaj.

— Kiu venkis? — Li ekdemandis.

— Amasaĉo! — respondis ia
voĉo malgaje.

— Sude la armeo komplete detruita.

— La ŝiparo dronigita.

— La malsupera parto de l' urbo
estas jam en la manoj de l' amasaĉo.

— La militistaro sur la remparoj
transiris jam al la ribelo.

— La taĉmento de l' acrostatoj
aligiĝis al ili.

— Ĉio perdita! Ĉio!

(daŭrigota).



SŁOWNIK RADJOWY ESPERANCKO-POLSKI

Zestawił Dr. Leopold Dreher.

Agordi	stroić	konekto	połączenie
akvotubo	rura wodociąg.	krado	siatka (lampy)
akumulatoro	akumulator	kristalo	kryształ
alluti	przylutować	kupli	sprzęgać
amplifikatoro	wzmacniacz	kupro	miedź
anteno	antena	kurento, alternak.	prąd, zmienny p.
— ekstera	zewnątrzna	Lampricevilo	odbiornik lamp-
— interna	wewnętrzna	laüt(parol)ilo	głośnik [kowy]
aparato	aparat	Masto	maszt
aparataro	aparatura	metalfolio	blaszka
Bambua stango	pręt bambusowy	metalpinto	drucik
baterio	baterja	Oksidaĵo	śniedz
bobeno	cewka	omo	om
bobenujo	sprzęgacz	ondo	fala
borno	zacisk	ondolongo	długość fal(i)
(branĉo) 1—, 2—,	1—, 2—, żyłowa	Plato	plytka anodowa
branĉa anteno	antena	plumbo	ołów
bronz	bronz	punkto, sentema	punkt, czuły
Cirkvito	obwód	Radiaĵoj	sprzęt radiowy
Detektoro	detektor	reostato	opornik żarzenia
Ebonito	ebonit	rezistanco	opór
eligilo	eliminatory	ricevilo	odbiornik
enfosi	zakopać	Senda stacio	stacja nadawcza
Faceto	ścianka	soklo	podstawka
fadeno, metal-	drut	stanpapero	stanjol
fiksi	przytwierdzić	Ŝraŭbo, ŝraŭbeto	śrubka
filamento	drucik żarzenia	Telefonio	telefonja
frekvenco	częstotliwość	tensio	napięcie
Galeno	galena	terkonekto	uziemienie
Izoli	izolować	Valvo	lampka katodowa
Komponajo	część składowa	valvingo	podstawka do
kondensatoro	kondensator	vibrado	drżanie [lamp
varia k.	zmienny k.	Zinko	cynk
konduktoro	przewód		



ESPERANTISTA MOVADO.

LA DEKA DATREVENO DE LA MORTO DE D-RO L. L. ZAMENHOF.

La 14-a de aprilo!

Neordinara dato por la Esperantistaro. Ĉie, kie batas esperantista koro, tiu tago estas distingata...

Ĝi estis antaŭ 10 jaro. Fermiĝis tiam por eterne la okuloj de nia genia, estimegata kaj plej amata Majstro... Kaj ekde tiu tempo, la Esperantistaro sankte gardas tiun tagon... En la tuta mondo kunvenas hodiaŭ la samideanaro.

Sed nenie la soleno povis esti tiel esprimita, kiel ĉe ni en Varsovio, en la lulilo de Esperanto — alie: en la Mekka de l' Esperantujo.

Sur la tombo mem!

* * *

Simpla, modesta kronik-sciigeto en kelkaj lokaj gazetoj kunvenigis la varsoviajn Esperantistaron sur la tombo. Kaj kvankam estis labortago, kvankam estis laborhoro — stariĝis, kvazaŭ je ordono, la fidelaj anoj de nia pacarmeo por partopreni la plej grandan honoron, la plej altan respekton, la plej neesprimeblan gloron — kiun ni neniam ĉesos ŝuldi al nia kara Majstro.

Sen pompoj, sen bruoj, modeste, kiel Lia spirito, kiel tuta Lia vivo, senbrue, kiel Lia movado, kiel Liaj ideoj, kaj senpompe kiel Lia morto kaj entombigo — same modeste ni solenis la dekan datrevenon...

Belege dekorita la tombo. Floroj, verdaĵoj kaj arbetoj ĉirkaŭe ornamas la monumenton, kvazaŭ dezirante per si mem kovri al ni la ceteran videblon kaj tiel devigi, ke niaj rigardoj estu koncentrigitaj je la tombo. Ambaŭflanke la honora gardistaro, junaj lernantoj senhezite tenas la verdajn standardojn.

Je la dektria horo s-o S. Essigmann malfermas la ceremonion. Mallonge informante pri la signifo de l' hodiaŭa tago, li transdonas la parolon al la universitata kolego de l' Majstro, la prezidanto de la Pola Esperanto Deligitaro, prof. D-ro Odo Buiwid, kiu speciale venis tiucele el Kraków.

Intertempe la ĥoro disstariĝita diversflanke ekkantis la „Esperon“. Du fraŭlinoj alportis grandegan florkronon kaj metis ĝin antaŭ la monumenton. Al la krono estis alkrōita dekstre longa kaj larĝa rubanco kun surskribo: AL NIA NEFORGESEBLA MAJSTRO JE LA X DATREVENO DE LIA MORTOTAGO. Maldekstre estis rubandoj kun la subskriboj de ĉiuj varsoviaj kaj krakovaj societoj kaj grupoj.

Sekvis la paroladoj. Rakontis prof. d-ro Buiwid pri la tragedio de la lastaj tagoj de la Majstro, kiu en sia koro de kolomba boneco kaj mildeco dum la tuta vivo revis pri pacigo kaj harmoniigo de l' homaro kaj estis devigita ĝisvivi brulojn, perfortojn, sangon kaj sovaĝan kruelon de l' interfrata batalo... Klarigis prof. Świecimski, maljunulo je l' baston' apogita, kiu de la lito de malsano leviĝis por partopreni la solenon, la ĉefajn motorojn de l' Zamenhofa verko: AMO, KREDO kaj ESPERO, kiuj vivigas kaj potencigas lian kreaĵon... Promesis belgracia oratoro, f-ino M. Szenfeld

fidele konservi la Internan Ideon de Esperanto entenatan en la „Preĝo sub la Verda Standardo“... Homagion esprimis L. K. - ano kaj gvidanto de Pola Instituto de Esperanto, s-o E. Wiesefeld.

La ceremonion finis „La Espero“ kantata hore. La gardstarantoj kunrulis la standardojn...

Fotografaj aparatoj funkciis la tutan tempon eternigante la kore-difan momenton.

Varsovio, la 14. IV. 1927.

Edward Wiesefeld.

IV. MIĘDZYNARODOWY KONGRES MEDYCyny WOJSKOWEJ.

W Warszawie odbędzie się od 30. V. do 4. VI. 4-ty Międzynarodowy Kongres Medycyny i Farmacji Wojskowej, który zapowiada się b. licznie, gdyż zgłosili już swój udział przedstawiciele 20-narodowości. Kongres jest pod protektoratem Prezydenta Rzeczypospolitej, do Komitetu Honorowego należą prawie wszyscy Ministrowie i najwyżsi przedstawiciele społeczeństwa. W programie jest przyjęcie delegatów państw przez Prezydenta Rzeczypospolitej, raut w Prezydjum Rady Ministrów, uroczyste przedstawienie w Operze, zwiedzanie miasta, instytucyj publicznych, wycieczki do Krakowa, Zakopanego i t. d.

Komitet Organizacyjny Kongresu, na czele którego stoi Szef Depart. Sanitarnego Minist. Spraw Wojskowych, Generał Dr Śt. Rouppert, odnosi się przychylnie do sprawy oficjalnego wprowadzenia Esperanto do obrad kongresowych. Na ostatniem posiedzeniu Stałego Komitetu tych Kongresów w Brukseli polscy delegaci Gen. Dr Rouppert i Pułk. Dr Zakliński, poparli naszą sprawę: Wszyscy inni delegaci przyjechali do Brukseli już z góry przychylnie usposobieni dzięki pracy esperantystów w odnośnych krajach. Wskutek tego w Brukseli zdecydowano powierzyć referat w sprawie Esperanta jednemu z delegatów, który ma wypracować wnioski na Kongres.

Tak więc od samego Kongresu Warszawskiego zależeć będzie przyjęcie lub odrzucenie wniosku. Zarząd T. E. K. A. wniósł oficjalną petycję do Komitetu Organizacyjnego Kongresu, motywując potrzebę i celowość wprowadzenie Esp. — Teraz zależy wszystko od poparcia ze strony samych uczestników Kongresu. Ponieważ weźmie w nim niewątpliwie udział wielu lekarzy polskich, zarówno wojskowych i cywilnych, jest pożądanę, aby ci w pierwszym rzędzie okazali naszej sprawie swą pomoc podczas głosowania. Lekarze — esperantysty winni bezwarunkowo stawić się licznie na kongresie, — tembardziej, że planowane jest urządzenie posiedzenia czysto esperanckiego z odczytem i dyskusją naukową wyłącznie w języku Esp., — na to posiedzenie będą zaproszeni wszyscy naczelnicy Kongresu.

Zarząd T. E. K. A. uprzejmie prosi lekarzy — esperantystów polskich i sympatyków naszej sprawy o zgłaszanie się piśmienne lub ustne do *Dra Róbin*, Warszawa, ulica Marszałkowska L. 113 (telefon Nr. 7301), celem wspólnego zorganizowania akcji.

Dr W. Róbin.

Wiceprezes T. E. K. A.

POLLANDA KRONIKO.

BĘDZIN. En TUR (Societo de Laborista Universitato) estis komencita kurso kun 14 personoj. La temo koresponda: Popolaj domoj kaj nia laboro en ili. Oni adresu: Redakcio „Głos Zagłębia“, Pollando, Dąbrowa Górnicza, str. 3 Maja, Kamarado Radek.

DĄBROWA GÓRNICZA. En urba lernejo okazis solena senvualigo de la portreto de Zamenhof, farita de samideano en Biała Podlaska laŭ deziro de l' gelernantoj. Sabaton la 9. IV. okazis esperanta vespero kun eksteraj gastoj kaj 80 esp. lernantoj. Esp. liinno hora, parolado de l' direktoro, s-o T. Dobrowolski, deklamoj, muziko de s-o Adamczyk kaj kantoj de S-o M. Dobrowolski bono sukcesigis la vesperon. La muroj de l' ĉambro estis ornamitaj per multaj kursaj korespondadoj. La distrikta ĵurnalo „Expres Zagłębia“ favore skribas artikolojn kaj kronikon poresperantan, demandante la legantojn, ĉu ili tion deziras. Samideanoj nepre respondu al la redakcio. Dum la ekspozicio de la pola libro en Sosnowiec kaj Dąbrowa UEA-grupo en Sosnowiec montris ankaŭ esperantajn librojn eldonitajn aŭ tradukitajn de polaj aŭtoroj. En Sosnowiec okazis en la ejo de ekspozicio prelego de S-ano Czechowski pri: Signifo de la esperanta libro en la tutmonda literaturo.

KATOWICE. Samideanoj el Borysław, Poznań, kaj Sosnowiec propagandis vorte kaj ekspozicie dum la landa kongreso de TUR. Bone ili preparis la fundamenton por dumjara verdigo de la TUR-filioj. La grupoj ĉe la filioj estu afablaj interkomunikiĝi kun la grupo en Sosnowiec.

KRAKÓW. La 24. III. okazis ĝenerala kunveno de societo „Esperanto“. Ĉestis 40 personoj. El la raportoj oni povis konstati grandan pro-

greson kaj plivigliĝon de nia movado en Kraków. Dank' al la afableco de inĝ. Tor, direktoro de Industria muzeo, la societo ricevis bonegan ejon, kie povis disvolviĝi vigla kaj efikplena agado. Al nova estraro estis elektitaj: Prof. d-ro Bujwid prez., d-ro Dreher vicprez., s-inoj Neuberg kaj Mazaraki kas-inoj, s-oj Hodakowski kaj Kutscher sekr-oj, s-o Swaryczewski bibl., s-inoj Srebrna kaj Rubinstein mastrinoj. Rev. kom.: s-oj Rudnicki, Goldberger kaj Ziomek. Laŭ propono de s-o Bujwid la kunvenintoj honoris per leviĝo la memoron de sia honora membro s-o Kaszycki mortinta antaŭ nelonge, kiu estis unu el la plej malnovaj kaj fervoraj batalantoj por nia ideo.

LUBLIN. Ĉe la loka filo de P. E. A., krom la „Virina Sekcio de Mezlerneja Junularo“ kun 35 membroj, fondiĝis kaj ekfunkciis sama „Virina Sekcio“ kun 15 aninoj. S-o C. Pruski gvidas por ili kurson. Ĉe la str. Kozia estas malfermita ĉapelmagazeno kun esperanta ŝildo „Bela Virino“.

RADOM. En la jara ĝenerala kunveno de Pola Esperantista Societo estis elektita sekvanta estraro: S-oj J. Wojas pzez., J. Dolecki vicprez., M. Kowalczyk sekr., M. Pryłuski kas., M. Skalski bibl., M. Białecka kaj W. Włazłowicz anstataŭantoj. La 10. III. estis finita 3-monata kurso kun 18 membroj.

SOSNOWIEC. TUR-kurso decidis korespondi laŭ ta temo: „Kion ni faras kulture kaj amuze post la 8-hora labortago“. Eksterlandanoj adresu: Pollando, Sosnowiec, str. Orla 8, S-o inĝ. C. Uthke.

SUCHA. La 29. III. aranĝis s-o notario S. Pęksa publikan prelegon pri lingvo internacia; ĉeestis ĉ. 100 personoj Tuj poste li komencis en la

urba lernejo kurso de Esperanto, al kiu enskribiĝis 40 personoj, plejparte junularo.

WARSZAWA. En la gimnazio de Kulwieć (pl. Trzech Krzyży 8) fondiĝis fervora grupeto da lernantoj, kiuj eĉ kontraŭ la intencoj de ne tre favora por nia afero direktoro, vigle studas Esperanton kaj ĝian internan

ideon. La rezulto de tiu vigleco jam montriĝas en la eldonata de tiuj junuloj revueto „Wzwyż“ en la formo de tre interesa „esperanta angulo“ tre lerte kaj bonstile redaktata. Oni devas esperi, ke la varsoviaj samideanoj subtenos kaj helpos la simpatiajn lernantojn en iliaj laboroj kaj aspiruoj.

KRONIKA ZAGRANICZNA.

RADJO. WIRELESS WORLD, najpoczytniejsze angielskie czasopismo radjowe rozpisalo ankietę w sprawie użycowania esperanta do zapowiadania programów itp. przez wszystkie stacje radiowe na świecie.

KURS ESPERANTA przez radjo w Paryżu skończył obecnie Dr. Corret. Kurs składał się z 40 lekcyj, prowadzonych metodą rozmówkową w ten sposób, że wykładowca przyprowadzał na stację esperantystów - obcokrajowców, aby słuchacze poznali międzynarodową wymowę esperanta. Było tak reprezentowanych 14 narodowości.

NOWE RADJOSTACJE, oprócz już istniejących, zaczęły ostatnio nadawać esperanckie kursa i programy, a to: w Estonji - Tallin, w Japonji - Nagoja i w Szwecji Falun (wtorki f. 400-g-19).

„RADJOAMATOR“, główna gazeta radjowa w ZSRR drukuje stale esperanckie streszczenia swych artykułów, a „radjokronika Sowieców“ wydawana jest wyłącznie po esperancku.

PROGRAM kursów i przemówień esperanckich nadawanych stale przez ważniejsze stacje w Europie:

Wtorek — 1. Klagenfurt — 1·5 kW — f. 272·7 — g. 19¹⁰, 2. Innsbruck — 0·5 kW — fala 294·1 — g. 19¹⁰. 19³⁰, 3. Zagrzeb — 0·35 kW — f. 310 — g. 18³⁰, 4. — Królewiec — 4 kW — f. 329·7 — g.

19³⁰ - 20, 5. Graz — 4·5 kW — f. 357·1 — g. 19¹⁰, 6. Lyon — 1·5 kW — f. 391 — g. 21, 7. Wiedeń — 20 kW — f. 517·2 i 577 — g. 19¹⁰.

Środa — Moskwa (Stacja Kominternu) — f. 1450 — różne wiadomości 22 - 22⁵⁵.

Piątek — 1. Gliwice — 0·7 kW — f. 250 — g. 22¹⁵, 2. Zagrzeb — 0·35 kW — f. 310 — g. 18³⁰, 3. Wrocław — 4 kW — f. 315·8 — g. 22¹⁵, 4. Lyon — 1·5 kW — f. 391 — o esperancie — g. 19³⁰, 5. Genewa — 1·5 kW — f. 760 — g. 20²⁰.

Sobota — Königswusterhausen — 8 kW — f. 1250 — g. 15³⁰ - 16.

„RADJO-CLUB Esperantiste de France“ powstał ostatnio w Paryżu. Ma on na celu zastosowanie esperanta w ruchu radjowym, propagandę idei języka międzynarodowego w kołach „radziarzy“.

* * *

AUSTRJACKIE ministerstwo poczt i telegrafów urządziło dla swoich urzędników kurs esperanta.

BELGIJSKA gazeta stencograficzna „Revue Sténographique Belge“ podaje w każdym numerze streszczenia po esperancku.

CZEŚKA Akademia Handlowa w Morawskiej Ostrawie wprowadziła naukę esperanta. Sław.



ADMINISTRACIAJ SCIIGOJ.

I. GARANTIA FONDO DE „POLA ESPERANTISTO.

Por Garantia Fondo de nia gazeto deklaris pomonate:

S-o St. Pęksa, notario en Sucha zł. 10.

Pagis jam por Garantia Fondo de P. E.:

P-o D-o Bujwid por III. — 30 zł.; S-o Pęksa por IV. — 10 zł.; D-o Rosenstock por III. — 10 zł.; S-ino Rubinstein por III. — 10 zł.; F-ino Weinsberg por III. — 5 zł.; por IV — 5 zł.

II. GARANTIA ĈENO DE „POLA ESPERANTISTO“.

1. D-o Maksymiljan Blassberg pagas zł. 20 kaj petas, ke sekvantaj gesinjoroj pagu lauvolan sumon: Redaktoro Berman (Łódź); D-o Woynarowski (Chrzanów); D-o Perelman (Sosnowiec); S-ino Klemensiewicz; S-oj Piotrowski k. Rudnicki (Kraków); S-o Zajączkowski (Warszawa).

2. G-oj Alfred k. Frida Hinc pagas zł. 15 kaj alvokas S-inon H. Pankratz, la edzinon de Sejndeputito, pagi ne minimume la saman sumon, sed lau ebleco.

3. S-o Józef Litauer pagas zł. 6 kaj alvokas gesinjorojn el Varsovio: adv. Tadeusz Róbin; adv. St. Arnstein; Ignacy Koss; Fraulinioj Szenfeld; D-o med. Muszkatblat, Kazimierz Domosławski.

4. S-o Włodzimierz Pfeiffer pagante 10 zł. alvokas: Stanisław Karolezyk (Warszawa); Jan Kostecki (Paris); Remigjusz Mączyński, Tadeusz Wisławski, Mieczysław Kazimierzczak k. D-o Arkadiusz Goldenberg (Łódź).

5. S-o Fr. Prengel pagas 2 zł. kaj alvokas pagi lauvolan sumon s-ojn: P-o Synchronski, Konstany Chmielewski k. S. Szule (Bydgoszcz); P-to Roman Wiśniewski (Gniew); Leonard Borkowski, instruisto (Poznań); Antoni Szpakowicz (Białowieża); Edward Wiesensfeld L. K. (Warszawa); P-o Resport (Stryj); Jan Szalla red. de „Dziennik Bydgoski“ (Bydgoszcz); Feliks Gross red. de „Zgoda Narodów“ (Kraków).

6. Leon Ringler pagas zł. 5 kaj petas jenajn gesamideanojn pagi laupovan sumon: Eug. Jaworska, D-o Janusz Rauch, Zofio Kecht, Ida Geller, Marek Feurstein, Józsi Gál, Chaim Altmann k. Franciszek Pelc (Borysław); P-o D-o Michał Friedländer k. Franciszek Tunkwaller k. N. Wojtuśiszyn (Tustanowice); S-inoj N. Melnarowicz, Kondrativna (Drohobyč); A. Marczewski, lernejdirektoro (Sambor); D-o I. Fels, ŝat. edzino k. fraulino; W. Niżnik k. H. Wierzchowski (Lwów); Roman Wulczek k. Szymon Sagala (Bitków).

7. Maurycy Sternberg pagas 10 zł. kaj alvokas gesinjorojn: Regina Fischel (Katowice); Regina Dunsky (Beuthen, German.); Luiza Srebrna (Kraków); D-o Józef Durst (Przeworsk); N. Niedźwiedz (Szopienice); Czesław Pruski (Lublin).

8. M. Wygocki (Orla) pagas 2 zł. kaj alvokas: Kozłowski, urbkonsilanto, Landau, Rozen kaj la ceteraj (Będzin); Koss k. Rusek (Warszawa); Duńska k. Melcer (Katowice); Izraelewicz, Głieksztajn k. Ryterband (Dąbrowa Górnicza); Eksztajn k. Gersznat (Piotrków).

9. Bolesław Głuchowski pagas 5 zł.

10. Izrael Lejzerowicz pagas 5 zł.

11. Paweł Szczurek pagas 5 zł.

12. Zofja Trybułowa pagas 5 zł.

!!VIVU SEKVANTOJ!!



Redaktor odpowiedzialny: Juliusz Kriss.

Drukarnia Muzeum Przemysł. pod kierownictwem St. Baranowskiego w Krakowie, Smoleńska 9